



LA RIFUĜEJO SUB MINACO

Turkio severigis siajn minacojn kontraŭ Roĵavo, sed ĝi ne forgesis pri Meĥmuro(1), la rifuĝejo, kiun la nordaj kurdoj(2) havas en Suda Kurdio(3). Ili starigis tie propran modelon de socia organizo.

Antaŭ kristnasko(*), turkaj aviadiloj atakis Meĥmuron kaj mortigis kvar civilulojn. Dum la lastaj tagoj, Ankaro severigis siajn minacojn kontraŭ Roĵavo, sed tiu ĉi aeratako servis kiel memorigilo pri tio, ke la nordaj kurdoj kaj ties posteuloj, rifuĝintaj en Suda Kurdio ne estas tute ekster danĝero de la turkaj krifoj. La rifuĝintareo de Meĥmuro situas pli ol tricent kilometrojn for de la limo inter Turkio kaj Irako. Ĝi estas speco de laboratorio, tre speciala laboratorio pri la Demokrata Konfederaciismo proponita de Abdullah Ocalan, la enprizonigita kurda gvidanto. Pli ol 13 000 homoj forfuĝintaj el Norda Kurdio memorganiziĝis en tiu areo, surbaze de la politikaj, sociaj kaj kulturaj proponoj faritaj de la karisma kurda estro.

Plejmulto el la loĝantaro de Meĥmuro devenas el la vilaĝetoj de la regiono de Ŝirneĥo(4).

Ili estis devigitaj forlasi siajn hejmojn komence de la 1990-aj jaroj, kiam la turka armeo ekfunkciigis la politikon de “senhezita amasa neniigo”. Oni bruligis pli ol 4000 vilaĝojn kaj ties kultivareojn cindrigis. Konsekvence, plejmulto el la loĝantoj devis serĉi rifuĝon en aliaj urboj aŭ transiri la landlimon kaj instaliĝi en Suda Kurdio.

Kiam la kurdejoj fuĝintoj alvenis en Meĥmuron la regiono estis neloĝebla dezerto. Tamen, kiel memoras multaj el la unuaj rifuĝintoj, Saddam Hussein, la prezidento de Irako, tiun ofertis al ili kiel rifuĝejon. “Ni estas de la komenco en la kampadejo” klarigis Sadiq. “Mi ne scias, ĉu ni devus danki al Saddam pro tio, ke ni povis instaliĝi en la infero.”

En Meĥmuro ne estis akvo nek arboj. Nenio krom brulanta suno. Tiu perdita terpeco sufiĉe malproksimas de Heŭlero(5), la ĉefurbo de Suda Kurdio, kaj vere malfacilis akiri manĝaĵojn aŭ ion ajn alian. Tamen, la rifuĝintoj pretis transformi tiun dezerton en vivigan lokon. “Kompreneble, ni kredis, ke tiu estos provizora solvo kaj ke ni baldaŭ revenos en niajn vilaĝojn”, memoras Sadiq. “Bedaŭrinde, ni restas tie ĉi de pli ol dudek jaroj.”

Tiu peco de la dezerto havas nun kelkajn substrukturejojn: akvoprovizadon, verdajn zonojn, lernejojn, bibliotekojn, forcejojn, fruktarbojn... Sadiq emfazis, ke en la komenco la infanoj manĝis teron, “Ĉar estis nenio, sed tiuj tempoj jam pasis.”

Ĉiuj rifuĝintoj de Meĥmuro deziregas reveni hejmen, sed, ĝis kiam venas tiu tago, ili organiziĝas laŭ la kriterioj de la Demokrata Konfederaciismo kaj la strukturoj de la kolektiva memregado. La Popola Konsilantaro havas 131 membrojn, kaj 31 homoj – po unu reprezentanto de ĉiu fako de la rifuĝintareo – konsistigas asembleon.

Ankaŭ ekzistas Ina Konsilantaro. Ĝin konsistigas 81 homoj, kaj ĝi estas membro de la aŭtonoma administrado. Ĉiun duan jaron oni renovigas ĝin, kaj la anoj povas membri maksimume dum du periodoj. La ĉefa tasko de la Ina Konsilantaro estas alfronti la problemojn kaŭzitajn de la pensmaniero bazita sur la patriarĥismo kaj la pratradicio. Ĝi jam atingis rimarkindajn rezultojn: en la teritorio de la rifuĝejo la divorco estas laŭleĝa, oni disdonas kontraŭkoncipilojn, kaj la samseksemeco estas agnoskata. Krome, la rifuĝejo estas la unua teritorio, kie oni abolis la poligamion.

La rifuĝejo havas ankaŭ etan hospitalon. Ĝi estas sub la estrado de AKRUN⁽⁶⁾. Tie laboras du kuracistoj kaj kelkaj flegistoj. Ĉiuj estas volontuloj, kiuj ricevas etan salajron, por ties bazaj elspezoj. La hospitalo estas sufiĉe bone provizita. Veras, ke pro ĝia grandeco ĝi ŝajnas puphospitalo, ĉar ĉio nanas: la apoteko, la ĥirurgiejo, la akuŝejo kaj la eta ĉambro de la radiografiejo. Sed ĉio funkcias.

Problemoj pri la elektro

Ĝi funkcias, sed pene. La kuracistoj asertas, ke la elektro estas problemo: oni disponas pri ĝi nur dum dekdu horoj tage, ĉar la generatoro ne havas plian kapaciton. Tio ne estas la nura problemo: ne estas provizita ambulanco. Tamen, ili daŭre laboras ĉiutage, prizorgante la tiom bezonantajn rifuĝintojn, tieajn kaj deforajn. Fakte, la hospitalo akiris renomon en la regiono, kaj homoj de la ĉirkaŭaĵo kaj de pli malproksime iras al ĝi por ricevi sanprizorgon.

Ankaŭ popolan memdefendan sistemon ili havas. “Ni kreis protekt-taĉmenton, por defendi la homojn kaj la kampadejon”, diras Sadiq. En Meĥmuro ankaŭ estas martiroj. Oni aranĝis specialan lokon por ilin omaĝi. Estas simpla loko por memori tiujn, kiuj donis sian vivon por la komunumo, sed ĝi kortuŝas. Ĝi estas ĉambro, kun dekduo da ridetantaj vizaĝbildoj.

La homoj de Meĥmuro ne restas en la pasinteco; ili iras antaŭen per la motivoj, kiujn defendis la mortintoj. Tial, la demokratia memadministrado, krom starigi la inan organizadon kaj la hospitalon, zorgas pri la infanoj kaj junuloj. Ĝi ofertas al ili bazan kaj mezan instruadon, por ke ili povu poste iri en la universitaton. Estas 250 infanoj en kvin infanvartejoj, kaj 700 lernantoj kaj 33 instruistoj en 23 lernoĉambroj de baza kaj meza instruado. La homoj de Meĥmuro vetis por la estonteco, alfrontante ĉiujn malfacilaĵojn: militon, dezerton, bombadojn kaj la flankajn damaĝojn de la kruda kaj simplaĉa geopolitiko.



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Mexmûr.
- (2) Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.
- (3) Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la iraka ŝtato.
- (4) Shirnex (Sirnak en la turka).
- (5) Hewlêr.
- (6) Alta Komisaro pri Rifuĝintoj de la Unuiĝintaj Nacioj. U.N. Commissioner for Refugees, en la angla.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Orsola Casagrande.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 26-an de Decembro 2018-a.

Tradukis: NXC. Decembro 2018-a. Provlegis: DS.

